É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, JAN,2011.

R. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br

Donace por VK-ĉeestantoj
Perpoŝte, al foraj gesamideanoj, R$ 1,00.

.....

NIALANDA HONTO

Laŭ futbalo Brazilo situas inter la ok plej kapablaj landoj, sed ĉiuj tristas; laŭ Instrua- kaj Eduka skalo, Brazilo situas sur la 85ª ŝtupo sed ne rimarkeblas plendoj.

PROPONO

Tre modesta hejmo proponas al trankvila emeritul(in)o aŭ al geo staĝon kun la celo ĉiutage paroli en Esperanto, por atingi plenan fluecon en la lingvo. Oni subkomprenas ke la kandidato(j) devas bone regi E-gramatikaĵojn, esti diligentaj, ne-toksuzantoj, lernemaj kaj adaptemaj al la kondiĉoj en hejmo de geolduloj. Ĉeestas servistino de 9h ĝis la 15ªh, de lundo ĝis vendredo, por prepari vegetaranajn manĝaĵojn kaj helpi en la ceteraj aferoj ene kaj ĉirkaŭ la domo. Uzeblas telefono kaj komputilo. Mia domo, senaŭta, situas 1000m for de plej proksima urbeto kun ĉ. 14 mil loĝantoj kaj distas 70 Km (NW) de la ĉefurbo Porto Alegre-RS. Sciatas ke malfacile troveblas tiel liberaj homoj. -- Certe oni tenu kontaktojn antaŭ ol alpreni decidon, eĉ se nur por interkonatiĝa vizito kaj pliaj detaloj. Telf.51.36351389

ĈU VI SOLIDARAS?

Jarfine 2010ª, dum V-Kafo, oni elpensis manieron logi Sinjorinon Fortuna ke sxi, pere de amaso da vetantoj kun la sama nobla intenco, fariĝu favorkora al la E-movado. Laŭ onidiroj, la sorto de multaj inerligitaj vetantoj pezas pli ol unu sola daŭra insistado. Ni devas provi dum iom da tempo por, se iu el ni estos trafita de granda premio, por investi duonon el ĝi en nian grandan Esperantujon nome, Bona Espero. Laŭvole ĉiu esperantisto vetu ĉiam kiam MegaSena anoncas premion pli altan ol kvin milionan. Ĉi iniciato ne senmonigas vin sed plantas esperon ke nia movado iam malstagnos. Ni povos almenaŭ provacele kontroli kiu el ni estas solidaraj per sia confirmo, kiom da kvar-poento(j) faris chiu vetanto dum la periodo de unu VK al la sekva.

PROPONO-II

Amo, vera amo al Esperanto estiĝas nur en homoj kiuj decidis plene ellerni nian belan lingvon. Kiu legas tekston sed stumblas kontraŭ vortoj kaj postlasas eĉ frazojn, neniam sentos amon al Esperanto, tial ne firme solidariĝas kun la movado.

Domaĝe neniu reagis al mia propono: lertiga legado/verkado en Esperanto, en la sidejo de GEA.

Hodiaŭ mi provas kapti ilian intereson per alia propono, nome: samideano aŭ geo kiu kuraĝas restadi du, tri tagojn ĉe mi, kun la celo aktive partopreni en miaj ĉiutagaj okupoj kaj eluzi la tutan tempon por paroli nur en Esperanto, bv manifestiĝi al mi. Telf. 51 3635.1389 por ekscii pliajn detalojn

DOMAĜO

Konsiderendas trista domaĝo la fakto, ke nia legantaro tute ne reagas al proponoj/petoj faritaj pere de Gisto. Ĉu neniu leganto komprenas mian Esperanton? Ĉu ĉiuj abomenas na Gisto? Ĉu por vivigi nian "imense grandan" movadon ne valoras dediĉi duon horon, por diri (per computilo aŭ

perpoŝte: “entombiĝu, kaduka oldulaĉo!” Sciu ke la absoluta silento strangolas min. Bildigu al vi, ke vi elkovis tekston pri io interesa afero, proponas ĝin al via legantaro kaj petas reago(j)n, ĉu favorajn ĉu kondamnajn. Vi esperas kaj atendadas ke iu manifestiĝu. Ekzemple, pri la rakontoj ril.al Potato, k, rilate al Tomatoj, far D.Koimbra, sed venas al vi eĉ ne pepeto. BV ne troigi pravigante sin, ke vi ŝvitige laboris kaj ne restis duonhoro en la monato por dediĉi ĝin al nia tutmonda movado.

FOSTOJ – mesaĝoj:

Saluton samideano Zaghetto,
Jes, ja via grava kontribuo de 300 R$ alvenis sekure en la konton de Bona Espero kaj ni dankas vin kaj la aliajn kunlaborantojn sincere por via solidareco.

Aldonitaj, venis fotoj. Ili montras:300 fostojn malŝarĝatajn de kamiono; kelkaj rektaj partoj de pretaj bariloj tridrataj; bele ornamita salono plena de infanoj en uniformoj verdeflavaj; telecentro kun knaboj, ĝojaj, antaŭ komputiloj...vera festo por la okuloj kaj koro, plus granda salono plena de junuloj dum la Kristnaska Festo.

Jen, sekve, mesaĝo el Bona Espero kiu kvitancas la donacojn far VK-anoj:
- Kara Otto,
Nian sinceran dankon por esti nia ambasadoro dum la verda kaforondo!
Sed ne insistu tro, ĉar la samideanoj povus senti sin ĝenataj....
Hodiaŭ alvenis la unua kamiono kun 300 fostoj kaj tuj ĉiuj fortaj viroj komencis fiksi la unuajn en la terenon.
Granda momento de entuziasmo !
Dankon por viaj pliaj fostoj.
Signas :La Bonesperanoj

BV almenaŭ rideti, manke de pli “bonguste” spicitaj anekdotoj, senditaj de niaj avaraj legantoj. Ne kredeblas, ke inter ĉiuj rondanoj neniu trovas unu indan je la ĝuo de nia kolegaro.

SAĜA DEDUKTO

Lernanto al instruistino: ĉu vi scias la diferencon inter paraŝuto kaj kondomo?
Ŝi forskuis la demandon per “Sei la” por validi: respondu tiu kiu scias. La lernanto klarigis: Se la paraŝuto misfunkcias, rezultas malpli unu homo. Se kondomo misfunkcias rezultas unu plia homo en la mondo.

JUDA SANGO

Tre rarega sango vivigis tre riĉan judon. Iam li bezonis sangon. Homo kun samtipa sango transdonis duonlitron al li. Kompense la judo donacis al li luksegan aŭton. Post kelkaj tagoj la milionulo, en hospitalo bezonis plian litron da sango. La transdoninto, fortikulo kaj bonkora, decidis tuj liveri tri litrojn da sango al la malsanulo. Sekvan tagon li ricevis tri pasteĉojn. Kolere li frontis la judon kaj petis klarigon. Nu, mi transdonis duon litron kaj vi rekompencis min per BMW-auto. La duan fojon mi transdonis al vi tri litrojn da mia specifa sango kaj vi kompencis per nur tri pasteĉoj. Kial? La milionulo eksplikis...vi forgesis ke nun en miaj vejnoj fluas juda sango.

SEPARO

Renkontiĝas du amikoj kiuj delonge ne plu revidis unu la alian.

- Mia granda amiko! kiel vi fartas, kion vi faris dum la jaroj kiuj forpasis, kiel vi pilotas la vivon?
- Aĥ mia kara, mi navigas kontraŭ la ŝtormoj de la vivo. Mi edziĝis, naskigis tri gefilojn kaj separiĝis. Eĉ la disdivido de la bienoj jam plenumiĝis.
- Kaj la infanoj?
- Nu la juĝisto decidis ke, tiu ricevinta pli altvaloran parton, tiu restu kun la gefiloj.
- Do ili restas ĉe la patrino, mi supozas.
- Ne, ili restas kun la advokato.